


Bulgara **ESPERANTISTO**

ESPERANTO (1979-1980) (1973-1980) 1973-1980



E N H A V O

* * *	Al plua perfektigo de nia laboro	1
Jeanne de la Fontaine.	La lupo kaj la hundo. Tradukis prof. d-ro Stojan Ĝuĝev	3
* * *	Jubilea Literatura Konkurso	3
Marin Băcev.	Solena celebros de prof. d-ro Stojan Ĝuĝev	4
Akad. Petr Dinekov.	Prof. d-ro Stojan Ĝuĝev	5
* * *	Vivovojo kaj verkaro de prof. d-ro Stojan Ĝuĝev	6
K. V.	La Semajno de Internacia Amikeco en Sofio	7
Zahari Ivanov.	Sukcesa paŝo por la instruado de Esperanto en lernejoj	7
Kovo.	Metodika konferenco en Târgoviște	8
Valka Dankova.	La eksperimenta instruado de Esperanto en Popovo	8
Alfred Späthner.	Honormemore al bulgaraj patriotoj	10
* * *	Instruistaj E-Kursoj en GFR	11
* * *	Esperanto en granda ilustrita revuo de GDR	11
Detlev Blanke.	El Intervjuo antaŭ „Freie Welt“	13
Erika Bardocz.	Esperanto-ekspozicio en Budapeŝto	13
Sofia R.	Esperanto-letero	13
M. Băcev kaj E. Karastojanova.	Antaŭ la tombo de Ho Chi Minh (teksto kaj muziko)	14-15
* * *	Fecpasis Atanas Lakov	15
Zenta Ergle.	Ĉipo Fanfaronulo. Tradukis S. Neilande	16
* * *	Sciigo pri la Internaciaj Kursoj kaj Seminario de Esperanto per Instruistoj apud Nigra Maro	III
* * *	Sciigo de Bulgara Esperantista Kooperativo pri liver- eblaj E-libroj kaj someraj kursoj de Esperanto en Dru- ĵevo	IV

Sur la kovrilpaĝo:

„Amikeco trans limoj“ (amikokarto eldonita de Universala
Esperanto-Asocio)

Abonotizo: jara—1,40 levoj. Por eksterlando—3,44 lv., 5 rubloj, 2,50 dolaroj aŭ egalvaloro. Por Albanio, ĈSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Rumanio, GDR, Sovetunio, — 2 lv., 2,50 rubloj, 1 dolaro aŭ egalvaloro, Aparta numero — 0,14 lv.

Reklamtarifo: 0,15 lv. por sm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespondanconoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

EKSTERLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

(Pliaj perantoj el diversaj landoj estas serĉataj)

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco
Nullo 2, Paĵova.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pieng' jang
P. O. keso 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23
Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, P. O. Box 205,
Bucuresti 1.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, ul. Ŝvernika,
D. 7, kor. 3, kv. 44, 117 449 Moskva
V-449.

SVEDIO: Karl Krist, Deje, Box 109.



AL PLUA PERFEKTIGO DE NIA LABORO

La Rezolucio de la 38-a Kongreso de la Bulgaraj Esperantistoj postulas de ĉiuj gvidorganoj plibonigi la ideologian laboron en niaj vicoj. Sed ĝi, memkomprenelbe, ne subtakas la ĝisnunajn sukcesojn. Dank' al plan-agado en la Centro kaj iuj distriktoj BEA evoluis al unu el la plej fortaj kaj prestiĝaj landaj asocioj. Tion multfoje substrekis ankaŭ UEA dum kongresoj kaj internaciaj konferencoj.

Niaj gravaj sukcesoj estas atingitaj dank' al la favoraj kondiĉoj, kreintaj en nia lando post la forigo de la faŝista diktaturo, kiu persekutis esperantistojn.

La Bulgara Esperantista Asocio, kiel kultura organizo, trovis sian ĝustan lokon en la sistemo de politikaj kaj kulturaj organizaĵoj en nia lando. Ĝi kunlaboras kun la Patrolanda Fronto kaj la Profesiaj Unuiĝoj, kun la Junkomunista Unuiĝo, kun turistoj, filatelistoj k. a.

Plenumante la decidojn de la Deka Kongreso de BKP kaj ĝian Programon por konstruado de evolinta socialisma socio — antaŭpordo de la komunismo, nia lando jam faras konsiderindan scienc-teknikan revolucion. Ni do devas adapti nian laboron al la novaj taskoj.

Unue. BEA devas ellabori „Koncepton“ pri sia rolo nun kaj en la estonteco. Tiu ĉi koncepto devas antaŭvidi kiel enlandajn, tiel ankaŭ internaciajn taskojn.

Due. Ni devas ĝustigi kiajn propagandilojn BEA eldonos bulgarlingve kaj kiajn librojn, jurnalajn en Esperanto. Ni devas modernigi la studadon de Esperanto per la helpo de la radio, televido, gramofondiskoj ktp. Nur tiamaniere ni esperantigos parton de la bulgaraj junuloj. Kaj ne nur esperantigos, sed faros el ili agantojn, kiuj anstataŭos la nunajn agantojn en la centro, en la distriktoj kaj en la ceteraj loĝlokoj.

Trie. Kreante novajn kursgvidantojn, pedagogojn, aplikante la lingvon, ni devas havi kiel finan celon la oficialigon de la Internacia Lingvo.

La naciaj lingvoj estas gravegaj rimedoj por interkomunikado kaj pensado.

En la nuntempo ekzistas pli ol 2500 naciaj lingvoj, unuj evoluantaj, aliaj nun evoluantaj. Ĉiu lingvo havas sian devenon, sian historion, siajn perspektivojn. Tamen ili funkcias en sia naskiĝlando kaj en sia zono — ekz. la rusa, angla, hispana, franca. Ni postulas la oficialigon de Esperanto, ĉar neniu nacia lingvo povas fariĝi internacia.

Vera internacia lingvo povas esti nur artefarita lingvo. Ĝia ekzisto estas favorata de la epoko mem. La grandega evoluo de ĉiuj ekonomiaj fortoj, la rapidega progresado de la scienco ne nur kaŭzis la kreon de abunda lingvomaterialo kun internacia karaktero, sed ankaŭ ĉiam pli impete puŝas la homaron al multe pli forta integriĝo.

La naciaj lingvoj, eĉ kiam ili estas uzataj kiel helpaj por internacia komunikado, restas naciaj kaj laŭ siaj tradicioj, kaj laŭ sia interna strukturo. Alinaciano povas ellerni fremdan nacian lingvon pli-malpli bone, sed ne sentas ĝin kiel sian. La internacia lingvo estas propraĵo de internacia kolektivo kaj ĉiu persono, kiu ĝin scipovas kaj uzas, sentas ĝin kiel sian.

Esperanto pruvis sian taŭgecon jam dum jardekoj. Multaj eminentaj scienculoj, famaj verkistoj, konataj politikistoj esprimis favoran opinion pri ĝi, ekzemple Tolstoj, Henri Barbusse, M. Gorkij, Romain Rolan, Ciolkovski, Rabindranath Tagore, Franz Jonas kaj multaj aliaj.

Sian taŭgecon Esperanto montris per la pli ol 33 000 libroj aperintaj en ĝi — originalaj kaj tradukitaj, per centoj da periodaĵoj, aperantaj en ĉiuj landoj de la mondo, per la radio-disaŭdigoj de 19 radio-stacioj en 16 landoj, per prezentitaj dekoj da teatraĵoj (inter ili ankaŭ de la Bulgara Esperanto-Teatro) ktp.

En 1954 j. UNESKO akceptis rezolucion, per kiu ĝi rekonis, ke la rezultoj, atingitaj per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj, respondas al ĝiaj celoj kaj idealoj.

La valoro de Esperanto por la scienco kaj tekniko estas atestita interalie per la Deklaracio de 40 membroj de la Franca Scienca Akademio, de la Japana Scienca Konsilantaro, de famaj nuntempaj bulgaraj sciencistoj kiel la akademianoj Todor Pavlov, Vladimir Georgiev, Petr Dinekov kaj Georgi Naĝakov, la profesoroj d-ro Stojan Ĝuĝev, inĝ. Vasil Peevski k. a.

Esperanto estas bonega rimedo por defendo de la paco kaj kompreniĝo inter la popoloj.

Antaŭ 20 jaroj fondiĝis la mondpaca Esperanto-movado (MEM). Ĝi organizas kaj celdirektas la fortojn de la esperantistaro por defendo de la paco, minacata multfoje de la imperiistoj en diversaj anguloj de la tero. MEM estas rekonita de la Mondkonsilantaro de la Paco. Nuntempe du estas la faktoroj, kiuj detenas la imperiistojn eksplodigi novan grandan militon: la monda socialisma sistemo kaj la unio inter la ŝtatoj de la Varsovia Kontrakto kaj la mondopinio, kiu sin apogas sur la larĝaj popolamasoj.

Jen pro kio la esperantistoj devas turni pli da atento al MEM-movado, subteni ĝin, disvastigi ĝian gazeton „Paco“, kiu ekde 1974 j. aperos regule en nia lando.

La internacia klimato estiĝis pli favora por la Esperanto-movado. Premisoj por tio estas la pli aktivaj lastatempaj kontaktoj inter la Okcidento kaj la Oriento. Normaliĝas la ekonomiaj rilatoj inter Usono kaj Sovetunio.

Tio tamen ne signifas, ke ĉesos la antagonismo inter la kapitalista kaj socialista ideologioj. En niaj kontaktoj kun esperantistoj el Okcidento ni devas memori tion kaj saĝe defendi nian marksisman ideologion. Ni ne povas defendi etburĝajn ideojn, anarkismon, maoismon, individuismen.

Nia unueco devas baziĝi sur la principoj de demokratia centralismo, de kolektivismo. La membroj devas obei al la elektitaj laŭstatute estraroj. Nia Centra Komitato konsistas el pli ol 100 membroj, apartenataj al la malnova kaj nova generacioj. Ĝiaj decidoj estas devigaj por ĉiu membro.

Ekzistas tamen individuoj, kiuj obeas al si mem. Iu vojaĝas fremdlanden kaj facilanime reprezentas BEA; alia senrespondece juĝas pri asociaj kaj naciaj problemoj, sendas informojn pri nekontrolitaj aranĝoj ktp.

(Sekvas sur p. 4)

Poezio kaj beletrio

LA LUPO KAJ LA HUNDO

de Jean de la Fontaine

Malsata lupo vagis tra l'arbaro,
li havis nur la ostojn kaj la felon.
Renkontas li korthundon fortan, belan,
deflankiĝintan pro eraro.

Sinjoro lup' volonte lin atakus
kaj dispecigus lin subite. . .
Sed devus li pro tio ĉi militi —
kaj la hundego estis larĝtoraka,
sentima kaj defendkapabla.

La lupo proksimiĝas, preterpase
lin alparolas tre afable
kaj komplementas lin pro lia ventro grasa.
— Dependas nur de vi, nobela kavaliro,
fariĝi grasa kiel mi, — la hund' rediras,—
forlasu la arbaron! Vere,
mizere tie ĉi vegetas viaj fratoj —
fiuloj, mizeruloj kaj ceteraj —
kies destino estas morti pro malsato.
Nenia sekurec', eterna turmentado,
nek ia ajn senpaga vespermanĝo!
Ricevi ĉion sur la pinto de la spado!
Nu, sekvu min — kaj via sorto tuj sin ŝanĝos.
La lup' demandis:

— Kion, do, mi devos fari?
— Nenion preskaŭ. . . — diris hund', nur
boji, persekuti
la almozulojn kaj la homojn dubkondutajn,
grandulojn flati kaj humile antaŭ sia
mastro stari.

Kaj, kiel rekompenc' por tiuj ecoj,
vi havos la restaĵojn ĉiuspecajn
de lia manĝotablo: ostoj de kokidoj kaj
kolomboj,
por ne menciigi pri l'karesoj multenombraj. . .
La lupo forĝas paradizon el esperoj,
kaj lia kor' moliĝas jam pro sentoj tre
teneraj.
Hazarde vidas li kalvaĵon sur la kol de l'
hundo:

— Kio ĝi estas? — li demandas.

— Ho, nenio. . .

— Sed ĉi tiu vundo?

— Nur bagatelo. . .

— Kio?

— Nur cikatro, kiu memorigas
pri l'ĉen', per kiu min la mastro ligas.

— Li ligas vin? — la lupo diris. — Vi ne
povas kuri
do, kien ajn vi volas?!

— Ne ĉiam. . . Sed ĉu tio gravas?

— Jes, gravas! Tiom gravas, ke favorojn
viajn pluraĵn
mi tute ne bezonas, se liberon mi ne havas!
Je tiu prez' akceptus mi nenian ajn trezoron.

La lup' forkuris tuj kaj ekde tiam vagadas
ĝi ankoraŭ.

El la franca tradukis: Stojan Ĝuĝev

JUBILEA LITERATURA KONKURSO

Lige kun la glora 50-a jubileo de
la Septembra Ribelo de nia popolo
kontraŭ la kapitalismo, faŝismo kaj
monarkismo (1923) la Redakcio de
„Bulgara Esperantisto“ anoncas gran-
dan literaturan konkurson.

Partopreni ĝin povas ĉiu bulgara
aŭ eksterlanda esperantisto. La nombro
de la verkoj, originalaj kaj traduki-
taj — rakontoj, eseoj kaj versaĵoj —
ne estas limigita.

Limtempo por prezenti la konkur-
saĵojn: 1 de aŭgusto 1973 j.

Por la plej bonaj verkoj estos dis-
donitaj premioj (pri ili ni anoncos
en la sekvaj n-roj de „BE“).

La konkurso estas sekreta. La ma-
ŝin- aŭ mane skribitaj materialoj
devas esti subskribitaj per pseŭdonimo.
La saman pseŭdonimon oni skribu
ankaŭ sur fermita koverto, en kiun
anticipe metu papereton kun la vera
nomo de la aŭtoro kaj ties konstanta
adreso. La materialojn kaj la fermitan
koverton oni metu en pli grandan
koverton, ankaŭ subskribitan per la
sama pseŭdonimo, kaj sendu ĉion
rekomendite al adreso: „Bulgara
Esperantisto“, bul. Hristo Botev 97,
Sofio (Por la konkurso).

Gekamaradoj, amase partoprenu
nian Jubilean Literaturan Konkurson!

SOLENA CELEBRO DE PROF. D-RO STOJAN ĜUĜEV

La 31-an de januaro ĉi-jare la sofia esperantistaro solene celebris la 70-an naskiĝtagon de prof. d-ro Stojan Ĝuĝev — elstara bulgara esperantisto, membro de l' Akademio



Prof. d-ro St. Ĝuĝev

de Esperanto. La vasta aŭditorio 23 en la Sofia Universitato estis jam plenplena, kiam ĝuste je la 19 horo la jubileulo eniris salutata per aplaŭdoj de la ĉeestantoj.

La celebron malfermis Kunĉo Vălev, instruanto de Esperanto en la Sofia Universitato, kaj gvidis la unuan parton de la programo konsistantan el recitado de verkoj, tradukitaj en Esperanton de la jubileulo. Estis plenumitaj: „Nedisigeblaj“ de Penĉo Slavejkov (recitis K. Vălev), „Cigno, kankro kaj ezoko“ de I. A. Krilov (recitis Vasja Petrova), „La korvo kaj la vulpo“ de Jean de la Fontaine (recitis Morjana Văleva), „La lupo kaj la hundo“ de J. de la Fontaine (recitis Belka Beleva) kaj „Ĥaĝi Dimitro“ de Ĥristo Botev (recitis M. Ĉobanov). La belartan programon variigis per sia

majstra ludado je ksilofono Iskra Palleva kaj Boris Dinev — gelernantoj el la Muzikgimnazio.

La duan parton de la celebrado gvidis prof. Vasil Peevski. Post enkondukaj vortoj li donis la parolon al akademiano Petr Dinekov, kiu faris brilan raporton pri la vivo kaj riĉa agado de prof. d-ro Stojan Ĝuĝev. Li substrekiis, ke prof. Ĝuĝev jam 55 jarojn estas aktiva esperantisto, por kiu Esperanto fariĝis dua sorto. Detale pri la scienca agado de l' jubileulo parolis Blagovesta Nikolova — lektorino en la Bulgara Ŝtata Konservatorio. Takante tre alte la scienciston, ŝi emfazis, ke prof. d-ro Ĝuĝev kiel muzikologo la unua en la lando metis la esploradon de la popola muziko sur sciencan bazon.

Sekvis salutparoladoj al la jubileulo. La prezidanto de Bulgara E-Asocio Nikola Aleksiev tralegis la specialan adreson de la Estraro de CK de BEA al prof. Ĝuĝev kaj enmanigis al li horloĝon kun surgravuritaj inicialoj. En la nomo de la Esperanto-Sekcio de la Sciencistoj salutvortojn kaj bondezirojn prezentis prof. Vasil Peevski. Salutis la jubileulon ankaŭ: Georgi Dolapĉiev — en la nomo de la Distrikta-Urba E-Komitato en Sofio, Fani Miĥajlova — en la nomo de la Distrikta Komitato en Plovdiv, Kunĉo Vălev — en la nomo de la Sofia Instruista E-Societo „Diĉo Petrov“ kaj de la Sofia Grupo de Esperantistoj-Filologoj, Nano Nanov — en la nomo de la Sofia Urba E-Societo „Maksim Gorkij“, Asen Grigorov — en la nomo de SELEB (Sekcio de Esperantistoj-Literaturistoj en Bulgario), Katja Maneva — en la nomo de la Poŝtista E-Societo „Heroldo“, Dimitr Popov — en la nomo de la E-Societo en la Sofia Urba Transporto, Boris Simeonov — gvidanto de E-kurso por instruistoj en 28-a lernejo, Văskresen Anastasov, du lernantinoj el la E-Grupo, gvidata de Vanja Savĉeva, k. a. Oni enmanigis multajn florojn kaj memordonacojn al la celebrato.

Kortuŝita la jubileulo prof. Ĝuĝev dankis pro la diritaj al li varmaj vortoj kaj sincere deklaris: „Ĝetante rigardon al mia estinteco, mi povas konfesi al vi, ke la plej belaj kaj plej plenvaloraj momentoj por mi estas tiuj, kiujn mi dediĉis al unu idealo — Esperanto! Nenio kaŭzis al mi tian grandan moralan ĝuon, kiel la horoj, kiujn mi dediĉis al la esperantista movado!“

Marin Băcev

(El paĝo 2)

Nomojn ni ne citos, sed la faktoj estas nerefuteblaj!

Per individuaj mispaŝoj ni nenion atingos.

Ĝojiga tamen estas la fakto, ke la plejmulto de la bulgara esperantistaro agadas modeste kaj fervore, faras ĉion eblan por plialtigi la prestiĝon de nia Popola Respubliko kiel pacama kaj socialisma lando. Al ili ni turnas nin kun la firma kredo pri plua perfektigo de nia Asocio.

PROF. D-RO STOJAN ĜUĜEV

El la parolado de akademiano PETR DINEKOV

Profesoro d-ro Stojan Ĝuĝev jam trairis 70-jaran vivovojojn, sed tiuj 70 jaroj signifas malmulton, se temas pri lia vicleco, laborkapablo, fortiĝo kaj viveco. Sed kiam ni parolas pri lia vivovojo, ni ne povas ne tuŝi ankoraŭ unu ĝian flankon — lian partoprenon en la Esperanto-movado. Ĉi tie ni provos nur montri kelkajn momentojn, kelkajn datojn, kiuj parolas pri la granda loko, kiun Esperanto kaj la Esperanto-movado, la Esperantaj idealoj trovis en la utila vivo de prof. Ĝuĝev, vivo plena de tiom da laboro, tiom da sciencaj penoj, tiom multe da sociaj devoj. Ĉe li temas pri daŭra intereso al la Internacia Lingvo, pri interna sindonemo, temas pri sorto tiel grava en lia tuta vivo, kiel eble la muziko.

Unuafoje Ĝuĝev konatiĝas kun Esperanto kiel gimnaziano en 1918 j. La sekvan jaron li jam agitas la ceterajn lernantojn studi Esperanton. Li estas organizanto de Esperanto-Societo „Sredna Gora“ en urbo Panagjuriŝte, en kies agado partoprenas ne nur konataj poste esperantistoj, sed ankaŭ elstaraj estontaj sciencistoj kiel Cvetan Stajkov k. a. En 1920 j. Ĝuĝev komencas korespondi kun esperantistoj el la lando, ekzemple kun Ivan Dobrev kaj Cvetan Cvetkov el Karlovo, Gunĉo Gunĉev kaj Vasil Peevski el Pleven k. a. Piede li iras en urbo Pazarĝik kaj tie fondas E-societon kune kun Dimitr Tuĝarov, Aleksandr Kurtev, Jak Beĥar k. a. Jam tiam, 20-jara, li komencas traduki el la bulgara literaturo en Esperanton: „Nedisigeblaj“ de Penĉo Slavejkov, verkoj de Nikolaj Rajnov, Pejo Javorov, Dimĉo Debeljanov, Jordan Jovkov k. a. En 1921 li kreis kontaktojn kun la societoj de la junaj esperantistoj en la lando kaj preparas la unuan kongreson de la Bulgara Esperanto-Junularo. Ni vidas lin kiel aktivan partoprenanton en la Esperanto-movado en Sofio dum lia studado en la Ŝtata Muzikakademio (1921—1924). Interesa estas tio, ke en la granda Parizo, kie la atento povas distriĝi pro tiom multe da rimarkindaj monumentoj de la homa historio, de la homa kulturo, al tiom multe da ĉiutagaj aferoj, kiuj povas altiri kaj deflankigi la junan homon, dum sia tuta studado tie (1926—1931) krom serioze okupiĝi pri la muzikologio prof. Ĝuĝev aktive partoprenis la vivon de la esperantistoj. Li prelegas, kunlaboras al la Esperanto-gazetaro, kreas kontaktojn kun francaj

kaj alinaciaj Esperanto-pioniroj, inter kiuj la fama Théophile Cart (Teofil Kar), Louis Bastien, Pierre Corret, Georges Warnier, Eŭgeno Lanti k. a. Revenite Bulgarion li senĉese partoprenas la bulgaran Esperanto-movadon kiel vicprezidanto de Bulgara Esperantista Asocio (BEA), ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“, de 1945—1956 — prezidanto de BEA, en 1967 — prezidanto de la unua en Bulgario Instruista Ĉ-Societo „Diĉo Petrov“ ktp. En 1967 li ricevis grandan internacian rekonon — estis elektita kiel membro de l'Akademio de Esperanto.

Rimarkinda estas la energio kaj la granda intereso, kun kiuj prof. Ĝuĝev partoprenas la universalajn kongresojn de Esperanto: en Oxford — 1930 j., Londono — 1938 j., Bern — 1947 j., Malmö — 1948 j., Sofio — 1963 j., Budapeŝto — 1965 j., Vieno — 1970 j., Portland — 1972 j. Tiuj kongresoj ne nur donis al li eblecon konatiĝi kun esperantistoj el la tuta mondo, sed ankaŭ paroli antaŭ tiel grandaj mondaŭditorioj pri nia popolo, pri nia nacia kulturo, pri la intereso al Esperanto en Bulgario. Tio ĉi estas propagando de plej pura speco.

Dum tiu ĉi tuta periodo prof. Ĝuĝev tradukas en Esperanton, verkas multajn artikolojn en la Esperanta scienca gazetaro, propagandas la bulgaran sciencon penson al la ekstera mondo. Li kreas kontaktojn kun alilandopere de la Internacia Lingvo, ellernebla ankaŭ de la vastaj popolmasoj, de junuloj, de lernantoj ktp. Prof. Ĝuĝev tre bone posedas la grandajn eŭropajn lingvojn, sed li neniam rezignis pri Esperanto. Li estas rimarkinda ekzemplo ne nur de fideleco al la Internacia Lingvo, sed ankaŭ de profunda konvinko pri paca kunekzistado de Esperanto kun ĉiuj grandaj mondlingvoj. Parolante pri la esperantisto Ĝuĝev, ni devas diri, ke li ĝuste kiel aktiva partoprenanto en la Esperanto-movado sekvas la plej bonajn tradiciojn de la bulgara demokratia kaj progresema inteligentularo, kiu amas sian patrolandon, vivas kun ĝiaj grandaj celoj kaj idealoj, strebas aliformi kaj antaŭenigi ĝin laŭ la vojo de pli justa socia disvolvigo, sed samtempe li komprenas, ke eĉ ne unu lando, eĉ ne unu popolo povas vivi izolite de la aliaj popoloj, izolite de la tuta homaro. Tio estas internaciismo kun profundaj radikoj en la intereso de la popoloj, interna-

ALTA DISTINGO

La Ŝtata Soveto de Popola Respubliko Bulgario honoris per ordeno „Kiril kaj Metodi“ — I-a grado nian s-anon prof. d-ro Stojan Ĝuĝev lige kun lia 70-jariĝo kaj pro liaj meritoj en la disvolvo de la bulgara muzikscienco kaj muzikpedagogio.

ciismo, kiu estas subtenata de profunda kredo en la senco kaj la eblecoj de la internacia kunlaborado.



Akad. Dinekov raportas

Finante tiun ĉi mallongan karakterizon de nia eminenta sociaganto kaj tiel varme enamiĝinta en la Esperanto-movado esperantisto, ni provu trovi la vojon kaj la lokon de prof. Ĝuĝev meze de nia inteligentularo. Tiu inteligentularo kreas la epokon de nia Renesanco. Ĝia iniciatinto estas Paisij per sia „Historio“. Post Paisij venas tiaj elstaraj reprezentantoj kiel Sofronij, kiu plilargigas la penson de Paisij, kaj kiel Beron, kiu strebas jam al pli altaj kulturo kaj scienco kaj superpasas la naciajn bezonojn kaj la naciajn interesojn. Ni devas diri, ke ĉi tiu linio, kiun Beron kreas en nia kulturo, en la vivo kaj la sorto de nia inteligentularo, estis daŭrigita ankaŭ post nia Liberiĝo el la osmana jugo de niaj elstaraj verkistoj, literaturaj agantoj, kiuj, vivante el tio, kion nia popolo kreas kiel poezion, kiel grandan arton de la parolo, ĉiam konsciis, ke la nacia arto ne povas disvolviĝi izolate de la

granda movado de la tutmonda arto, de la tuthomara kulturo. Inter tiuj verkistoj estas menciindaj almenaŭ kelkaj nomoj: la nomo de Konstantin Veliĉkov senpere post la Liberiĝo, la nomo de Penĉo Slavejkov fine de la 19-a kaj komence de la 20-a jarcento, la nomo de Geo Milev dum la Unua mondmilito kaj tuj post ĝi, la nomo de Georgi Bakalov, kiu dum sia longa vivo faris multon por la aligo de nia popolo al la monda progresema kulturo. Mi pensas, ke la vojo de Ĝuĝev estas la vojo ĝuste de tiu inteligentularo, kiu serĉas harmonion inter la nacia, la gepatra kaj la flugo al novaj mondoj kaj novaj vastaĵoj. Kaj neniam tiu ĉi flugo estas deŝirita de la tero, el kiu ni eliras, el la tero, sur kiu ni tenas nin starantaj, por povi vivi starantaj, kiel kreaj personecoj. Ĝuĝev trovas bonegan harmonion tiurilate. Vere simbola estas lia destino kiel sciencisto, simbola estas lia vojo kiel sociaganto. Tiu homo, kiu ricevas tiel altan kulturon en unu el la plej grandaj centroj de la mondo — Parizo, tiu homo, kiu havis eblecon viziti multajn landojn de Eŭropo lige kun internaciaj kongresoj kaj renkontiĝoj kaj ekkoni tiom multajn el la reprezentantoj de la tutmonda inteligentularo, tiu homo — profesoro Ĝuĝev — estas specialisto pri la bulgara popola muziko, pri la kulturo de nia popolo, kiun dum jarcentoj kreadis la gefiloj de la bulgaraj vilaĝanoj kaj urbanoj kulturo, kiu kreskis el la profundaĵoj de la popola sorto, kulturo, kiu estas penetrita de la plej puraj naciaj sukoj. Kaj vi vidas, ke ĝuste inter la flugo de la homo kun grandegaj kulturaj intereso kaj lia agado kiel esperantisto estas nenia kontraŭdiro. Male — inter ili estas plena harmonio. Mi opinias, ke la vojo de la bulgara inteligentularo estas la vojo, laŭ kiu marŝis prof. Ĝuĝev kaj homoj kiel Ĝuĝev en nia kulturo.

La plialtiĝo de nia nacia kulturo povas rezulti nur pere de la rimedoj kaj la idealoj, al kiuj celis la plej bonaj — la demokratiaj, la progresemaj filoj kaj filinoj de nia popolo — pere de sia sciamo, pere de sia interna, spirita maltrankvilo, pere de sia strebo al ĉiam pli kaj pli da scioj, al ĉiam pli kaj pli vastaj horizontoj, en ĉiam pli kaj pli intima kunlaborado kun ĉiuj honestaj homoj en la mondo.


VIVOVOJO KAJ VERKARO DE PROF. D-RO STOJAN ĜUĜEV

Prof. d-ro Stojan Ĝuĝev naskiĝis la 19-an de decembro 1902 j. en u. Pazarĝik. Fundamentan lernejon kaj gimnazion li finis en u. Panagjuriŝte. De 1921 ĝis 1924 li estis studento en la Ŝtata Muzikakademio en Sofio, de 1926 ĝis 1931 studis muziksciencojn en la Pariza Sorbono, Francio. En 1934 li komencis instrui en la Muzikakademio (Sofio), kie en 1937 li fariĝis docento kaj en 1943 — profesoro. De 1954 prof. Ĝuĝev estis gvidanto de la katedro de muziksciencoj (historio de la muziko, muziketnografio, muzikakustiko kaj muzikpedagogio). Do, kvar jardekojn de sia vivo li dediĉis al la muziko kaj muzik-

pedagogio.

La verkoj de prof. Ĝuĝev superas 3000 presitajn paĝojn, al kiuj oni devas aldoni ĉirkaŭ 300 artikolojn, parto de kiuj havas la karakteron de sciencaj studoj. Inter liaj verkoj estas: „Ritmo kaj takto en la bulgara popolmuziko“, „Bulgara popola dancarto“, „Muzik-akustiko“, „Teorio de la bulgara popolmuziko“ (planita kiel 7-voluma, aperis ĝis nun 4 volumoj): „Ritmiko kaj metriko“ — 1-a volumo, „Melodiko“ — 2-a volumo, „Morfologio kaj prozodio“ — 3-a volumo kaj „Generalaj demandoj de la muziketnografio“ — 4-a volumo, „Bulgara popolmuziko“.

LA SEMAJNO
DE
INTERNACIA
AMIKECO
EN SOFIO



Amikeco trans limoj

La Semajno de Internacia Amikeco jam firmiĝis kiel bona tradicio en nia esperantista vivo. Sen ajnaj admonoj per leteroj aŭ cirkuleroj la bulgaraj esperantistoj multloke organizis diversajn E-arangojn dum la Semajno.

Tuturban kunvenon organizis la sofiaj esperantistoj. Pri la signifo de la Semajno kaj pri la novaj venkoj de la pacamaj fortoj en la mondo parolis Ĥristo Gorov — vicprezidanto de BEA.

Sekvis la tradicia — jam kvarfoja — manifestado de niaj E-poetoj kaj verkistoj, organizitaj en SELEB (Sekcio de la Esperantistoj Literaturistoj en Bulgario).

Originalajn verkojn tralegis Asen Grigorov

(poemon „Paco en Vjetnamio), Miĥail Ĉobanov (prozaĵon „En ĵunio“) kaj Miĥail Ŝekergiev (prozaĵon „Ŝtormo“). La versaĵon „Kun vi ni festas“ de Asen Grigorov recitis K. Vălev. Kun profunda emocio kaj vera artismo recitis versaĵojn Vera Văjarova: „Espero mia“ de A. Grigorov, „Nokturno“ de Prodan Prodanov kaj „Hirundeto“ de Ljuba Bojaĝieva. Versaĵojn de Bojaĝieva tralegis ankaŭ la lernantoj Veselin Anev („Kanteto“) kaj Petjo Ĉakovski („Leporeto“). Fine Veska Nakova rakontis legendon pri la deveno de „martenica“ — tradicia ornamaĵo de la bulgara popolo lige kun la 1-a de marto, signanta sanon kaj feliĉon.

K. V

ORGANIZA VIVO

SUKCESA PAŜO POR LA INSTRUADO DE ESPERANTO EN LERNEJOJ

Jam duan jaron kun permeso de la Ministerio de Popola Instruado en nia lando oni instruas eksperimente la Internacian Lingvon en kvin lernejoj konekse kun la decidoj de la III Maribora Konferenco por enkonduko de Esperanto en la lernejojn. Unu el tiuj kvin lernejoj estas la fundamenta lernejo en v. Ĵivkovo, Sofia distrikto. Ĉi tie de la komenco de tiu ĉi lernejo sub la gvido de l'instruistino Stojanka Alaĝova kaj kun la helpo de la direktoro Jordan Kĵosev 14 lernantoj de la 6-a klaso komencis lerni eksperimente Esperanton.

Por interŝanĝi pedagogiajn spertojn je la 18 de februaro ĉ. j. en la lernejo de Ĵivkovo estis organizita metodika konferenco. Krom la instruistoj de la eksperimenta instruado de Esperanto el la lando la konferencon ĉeestis ankaŭ la instruistoj, kiuj instruas fakultative Esperanton en 5 lernejoj de Sofia distrikto, kaj la instruistoj de Esperanto en la Teksa Teknikumo en Vraca, kie la lingvo estas instruata al 160 lernantoj en 6 klasoj.

La instruistino Stojanka Alaĝova faris modelan lecionon kaj montris praktike, ke jam post 6 lecionoj la malgrandaj lernantoj povas

legi, skribi kaj partopreni elementan konversacion en Esperanto.

La instruanto de Esperanto en la Sofia Universitato Kunĉo Vălev faris raporton pri la nuntempaj postuloj al la instruado de l'Internacia Lingvo.

En la diskutoj pri la modela leciono kaj la raporto, en kiuj partoprenis la plimulto de la ĉeestantoj, estis klarigitaj iuj aktualaj demandoj de la Esperanto-instruado, oni interŝanĝis sperton el la praktika instrulaboro.

La konferenco estis organizita de la Instruista Sekcio de BEA kaj la Sofia Distrikta-Urba Esperanto-Komitato kune kun la fako „Popola Instruado“ ĉe la Distrikta Popola Soveto. Ĝi estis gvidata de Vasil Bozarov — vicedirektoro de la Pedagogia Instituto „Todor Samodumov“ kaj prezidanto de la Instruista Sekcio de BEA, kaj Margarita Popova — inspektorino de la fako „Popola Instruado“ ĉe la Distrikta Popola Soveto.

La konferenco pasis je alta nivelo. Ĉiuj partoprenantoj disiris ege kontentaj.

Zahari Ivanov

METODIKA KONFERENCO EN TÂRGOVIȘTE

La 28-an de januaro ĉ. j. en u. Târgoviște okazis metodika konferenco de la fakultativa instruado de Esperanto en lernejoj. Ĉeestis 20 geinstruistoj el la urbo kaj la distrikto. Partoprenis ankaŭ reprezentanto de la fako „Popola Instruado“ ĉe la Distrikta Popola Soveto. El la Instruista Sekcio de BEA la konferencon partoprenis Kunĉo Vălev.

Modelan lecionon faris Maria Rajĉeva el

Târgoviște. Ŝiaj 16 lernantoj el la 5-a klaso montris tre bonan sukceson en la lernado de la lingvo.

En la pridiskutoj oni taksis alte la modelan lecionon. M. Rajĉeva laboras metodike senripoĉe, kun entuziasmo kaj artisteco kaj per sia sinteno kreas en la klaso viglan kaj agrablan atmosferon.

Kovo

LA EKSPERIMENTA INSTRUADO DE ESPERANTO EN POPOVO

Jam estas konate, ke en kelkaj lernejoj de kvin landoj — Aŭstrio, Bulgario, Hungario, Italio kaj Jugoslavio — estas organizita didaktika-pedagogia eksperimento (DPE) pri instruado de la internacia lingvo Esperanto. La eksperimento daŭros tri jarojn sub la gvido de d-ro Istvan Szerdahelyi — estro de la Esperanto-katerdo en la Universitato de Budapeŝto. La instruado estas farata laŭ lia lernolibro.


Laŭ ordono n-ro 2567 de la Ministerio de Popola Instruado en nia lando oni gvidas eksperimentan instruadon de Esperanto en kvin lernejoj.

En Meza Politeknika Lernejo „Hristo Botev“ en urbo Popovo ekzistas du eksperimentaj klasoj: kvina kaj sesa, t. e. 11-13-jaraj geknaboj. Dum la pasinta lernojaro tiu instruado komenciĝis kun 20 gelernantoj el la V-a klaso kiel fakultativa studobjekto. Ĉi-jare Esperanto estas devige instruata en nova V-a klaso al 38 gelernantoj. Ili studas Esperanton po du horoj semajne. La rezultoj estas sufiĉe bonaj. La lernantoj jam sukcese uzas la lingvon, precipe tiuj de la VI klaso.

Dum la instru-eduka procedo estas granda la signifo de la praktika aplikado de la lingvo. Jam pasintjare la lernantoj komencis kores-

pondi kun amikoj el Pollando, Hungario, Estonio, Germanio, Jugoslavio. Sed plej grandan signifon havas la interlerneja aplikado de Esperanto en la kadro de DPE.

Okaze de la Nova Jaro la lernantoj interŝanĝis gratulleterojn kun lernantoj el Hungario kaj Jugoslavio. Ili sendis leterojn ankaŭ al ĉiuj lernejoj en Italio kaj Aŭstrio, kie Esperanto estas instruata eksperimente, sed ne ricevis respondon. Plej regula kaj sukcesplena estas la korespondado kun lernantoj el Petriuja, Seĉovlje kaj Maribor (Jugoslavio), el Pecs, Endröd, Budapeŝto kaj precipe kun la eksperimenta klaso de s-ano Nagy Béla el urbo Oroszlany. La korespondado estas kaj kolektiva kaj individua. Plej akurate korespondas: Valentina Trifonova (Estonio, Hungario, Jugoslavio), Mimi Dimitrova, Mariana Kostova, Katja Stankeeva, Zlatinka Nenova, Julia Zlatilova, Cenka Dimova, Rumen Georgiev, Saŝo Stefanov, Dimitrinka Mladenova k. a. Ili interŝanĝas desegnaĵojn, manlaboraĵojn, bildkartojn, poŝtmarkojn, mapojn, insignojn ktp. Sed ne sufiĉas nur la skriba kontakto. La infanoj deziras vidi unu la alian. Ili interŝanĝis komunan foton kaj vidis sur ĝi siajn korespondantojn. Sed la persona kontakto estas multe pli in-



La eksperimenta VI klaso



La eksperimenta klaso de s-ano N. Béla



VERDA TABULO

K-do IVAN STRANSKI — sekretario de E-Societo „Radio“ en u. Pazarĝik, kolektis 62 abonojn de „Bulgara Esperantisto“ por 1973 j. La Redakcio dankas nian fervoran samideanon kaj bondeziras al li sanon kaj feliĉon!

URĜA!

GRAVA!

Karaj esperantistoj!

*Ĉu vi deziras aŭskulti esperantlingvajn novaĵojn pri la vivo kaj la lando de la sveda popolo? Ĉu vi konsentas, ke radio-disaŭdigoj en Esperanto estas tre gravaj por nia afero? Se jes, bonvolu tuj kaj amase sendi leterojn kaj pk al la Sveda Radio kun peto enkonduki Esperanton en sian programon. Do, skribu al adreso: **S-ro Bengt Gustafsson, Programa Direktoro de RS, S-10510, Stokholmo, Svedio.***

teresa, pli dezirinda, tial ili intencas organizi renkontiĝon kaj fari reciprokajn vizitojn. Ĉi-somere miaj lernantoj deziras partopreni la E-tendaron en Sikonda (Pecs) en Hungario kaj gastigi al siaj amikoj el Oroszlany. Sekvantisomere la hungaroj venos en Bulgarijon kaj gastos ĉe ni en Popovo.

Antaŭ du jaroj en nia lernejo estis fondita E-societo „Amikeco“. Ĉiuj anoj estas regulaj abonantoj de „Bulgara Esperantisto“. La societo estas kolektiva membro de la junpionira organizaĵo en la lernejo kaj aktive partoprenas la vivon en la Klubo de la Internacia Amikeco. Ili aranĝas E-ekspozicion el bildkartoj, fotoj, pentraĵoj, objektoj kaj diversaj materialoj, kiujn la korespondamiko sendis el eksterlando.

La progresinta grupo jam celebris solene la naskiĝtagon de Zamenhof kun belarta programo. Gaste venis tiam ankaŭ la komencantoj el la 5 klaso. La ses-klasanoj bone prezentiĝis ankaŭ dum gepatra-instruista kunveno, kiam la belarta programo estis aparte riĉa kaj altnivela. La publiko, konsistanta el gepatroj de lernantoj-esperantistoj kaj neesperantistoj, estis

ege kontenta kaj mirigita pro la tre bonaj rezultoj de la junaj esperantistoj.

*Vâlka Dankova,
gvidantino de la eksperimenta E-instruado
en Popovo*

La eksperimenta V klaso



HONORMEMORE AL BULGARAJ PATRIOTOJ

de Alfred Späther — Leipzig, GDR

Estis la printempo de 1918. En la tranĉeoj de Balkano troviĝis la bulgara junularo oferiĝdecidata de la mez-eŭropaj imperiistaj potenculoj. En montofortikaĵo en Makedonio germanaj kaj bulgaraj soldatoj estis en preparo. Pro la konstanta kunvivado inter ili tre baldaŭ kreiĝis amikecaj rilatoj. En la bulgara maŝinpafila roto estis laboristoj el havenurboj de la Nigra Maro, sed ankaŭ kamparanoj.

Per gestoj kaj bulgaraj kaj germanaj lingvoeroj ni provis kaj sukcesis interkompreni nin. Tiumaniere iom post iom mi eksciis, ke la negranda nigrabarba soldato estas maŝinisto el Varna, nomata Stojan. Liaj militkamaradoj estimis lin. Fiere li konfesis, ke li estas socialisto. Kiam oni komandis nin diversloken, li forte skuis miajn manojn kaj diris: „Nemima Krieg, immer Mir!“ (Ne plu milito, ĉiam paco!). Kaj donacis al mi foton, sur kiu li vidiĝis kun pitoreske ĉirkaŭvolvita mantelo meze de siaj kamaradoj.

Pasis monatoj. En la somero de 1918, post feriado, mi denove revenis Makedonion, al Kantalarci. Laŭplane nia kompanio post kelkaj tagoj devis esti anstataŭita kaj retirita kiel rezervo.

Estis belega vespero. La arda varmo de la tago iom malpliigis. De tempo al tempo tra la vilaĝo brue veturis ŝarĝaŭtomobiloj. El la direkto de la fronto aŭdiĝis obtuza krakado. Kun mia kamarado Wilhelm Erdenberger el Leipzig mi promenis sur la vilaĝaj stratoj, kiam stranga marŝantaro proksimiĝis. Estis bulgaraj soldatoj, sed ĉiuj senarmitaj, hermete ĉirkaŭitaj de aro da speciale armitaj

gardistoj. Malantaŭ la armitoj, kiuj gvidis la marŝantaron, paŝis du oficiroj ankaŭ sen armiloj, distingeblaj laŭ la epoletoj de subleŭtenantoj. Ni restis mire starantaj flanke kaj lasis preterpasi la marŝantaron, konsistantan el kelkaj centoj da homoj. La famoj pri ribelado de la bulgaraj soldatoj ĉe la fronto sekve estis vero. La pligranda parto de la grupo jam estis preterpasinta nin, kiam mi aŭdis iom kripligitan nomon. Kaj mi vidis mian amikon Stojan, kiu vigle mansvingis al nia direkto kriante: „Nemima Krieg, immer Mir!“

Post kelkaj monatoj la militfronto malligiĝis kaŭze de atakoj de la Entento. Remarŝante laŭlonge de la fervojreloj inter Üsküb kaj Vranje ni dumnokte aŭdis trompetsignalojn. Kontraŭ ni antaŭ kavaleriista grupo kun torĉoj rajdis blanke vestita homo svingante grandan blankan flagon. La bulgara ĉefkomandantaro proponis kapitulacion.

En la aŭtuno de 1919 en urbo Leipzig estis malfermita komunista librejo, kiun mi ofte vizitis. Iun tagon, kiam mi venis en la librejon, mi trafis la librejestrin diskuti kun malaltstatura nigrhara homo. Post saluto la librejestro diris: „Alfred, ĉu dum la milito vi estis sur la Balkano? Jen estas bulgara kamarado, konatiĝu!“ Ni interkonatiĝis kaj jam triope daŭrigis la konversacion. Mi eksciis, ke Angel Kasabov, tiel nomiĝis la bulgara kamarado, antaŭ nelonge kun aliaj kamaradoj estis veninta en Leipzig por studi ĉe la Leipziga universitato. Li estis instruisto kaj intencis ĉi tie kompletigi siajn konojn.

En la sekvanta tempo ni ofte renkontiĝis. Mi eksciis, ke Angel estis unu el la du subleŭtenantoj, kiuj pro rifuzo de militservo en 1918 marŝis tra Kantalarci frunte de la senarmigita soldatgrupo. Li rakontis al mi, ke la informo pri la venko de la rusaj kamaradoj efikis ĉe la bulgaraj soldatoj kvazaŭ

eksplodo de bombo. Kiam la bataliono, al kiu apartenis Angel, rifuzis el rezervejo reiri la fronton kaj la soldatoj senarmigis la oficirojn, Angel — intelektulo kaj oficiro — solidariĝis kun la vestitaj en uniformoj kamparanoj kaj laboristoj. Pro la rifuzo la bataliono estis venigita kiel krimula militunuo en la landinternon.

Post la kapitulaco, reveninte hejmen, en majo 1919 Angel partoprenis la unuan partitagon de la Komunista Partio. Nun estis veninta al Leipzig por finisian studadon.

En la citata jaro ne malmultaj studentoj el la balkanlandoj estis venantaj al Leipzig. Niaj bulgaraj amikoj baldaŭ fariĝis la centro de la marksisma propagando ĉe la Leipzig-a Universitato. Mi tre bone memoras la tagon, kiam Angel diris al mi, ke li kun unu el siaj kamaradoj estis vokita al la bulgara konsulo sur Karl-Taŭhnitz-strato. Tiu ĉi konsulo, Leipzig-a burĝo, minacis

forpeli ilin el Germanio, se ili ne ĉesus la revolucionan propagandon.

En la somero de 1923, dum promonado kaj konversacio pri politikaj problemoj, Angel ĉe nia disiĝo diris, ke tiu ĉi tago estas unu el la lastaj de lia restado en Leipzig. „Nin vokas la Partio, — li diris, kaj tiukaze ne eblas heziti.“ Kial ili estis vokitaj li ne aludis. Por Angel la singardemo estis la unua leĝo, evoluiginta el la konspirneceso de la revolucia partio.

Nur kiam en septembro 1923 la bulgaraj laboristoj kaj kamparanoj leviĝis kontraŭ la faŝismo, mi sciis, ke Angel kaj liaj kamaradoj kuraĝe kaj decideme danĝerigis siajn vivojn por la socialismo, samkiel ili sin tenis dum la milito kontraŭ la milito.

Neniam denove mi aŭdis ion pri Angel Kasabov. Sed mi scias, ke li estis unu el la herooj de Septembro 1923.

El la germana: Otto Bässler (Oto Besler)

ESPERANTO EN GRANDA ILUSTRITA REVUO DE GDR

La granda ilustrita semajna revuo de Germana Demokratia Respubliko „Freie Welt“ (Legu: Fraje Velt=Libera Mondo) en sia n-ro 50 de la 2-a de decembro 1972 dediĉas 4 grandformatajn paĝojn al Esperanto. La kialo estas letero de leganto al la redakcio kun peto ricevi informojn pri la internacia lingvo Esperanto. „Freie Welt“ aperas en 400 000 ekzempleroj, sed fakte ĝi estas legata de pli ol miliono da personoj.

Lige kun la peto de la leganto Gisela Relter — redaktoro de „Freie Welt“, prenis intervjuon de k-do Detlev Blanke — sekretario de Centra Laborrondo Esperanto de GDR. En tiu intervjuo s-ano Blanke donas trafajn sciencajn respondojn pri la esenco de la internacia lingvo Esperanto, pri ĝia deveno, historio, gramatiko, vortara riĉeco, literaturo, apliko en la scienco, pri la Esperanto-movado en Germanio kaj hodiaŭ en GDR, pri la E-movado en socialistaj landoj kaj la tuta mondo.

La intervjuo estas ilustrita per multaj fotoj de enketitaj civitanoj de GDR — kion ili scias pri Esperanto. Krome aparte estas donitaj la bazaj reguloj de la E-gramatiko, informoj de la E-gramatiko, informoj kie en la momento estas liveblaj E-lernolibroj kaj vortaroj en GDR, pri la E-revuo „Der Esperantist“ ktp.

TRA LA E★ MONDO

INSTRUISTAJ E-KURSOJ EN GFR

De la 3-a ĝis la 8-a de januaro ĉ. j. en la okcidentgermana urbo Paderborn okazis la duaj en la lando intensigitaj E-kursoj por instruistoj. Ilin partoprenis 25 personoj. La lecionoj okazis en la moderna lingva laboratorio de la loka universitato. Kun salutparoloj al la gekursanoj turnis sin la vicestro de la Urba Instrufako kaj la direktoro de la lingvolaboratorio. Kiel observantoj ĉeestis du instruistoj el Jugoslavio.

La rezultoj de la kurso estis tre bonaj. Nova intensigita E-kurso por instruistoj okazos dum la printempa ferio en la universitata urbo Sigen.

Laŭ „Pilo-pres“

Krome en la sama numero, „Freie Welt“ aperigas raportaĵon pri vizito de la sama redaktoro ĉe la elstara soveta Esperanto-poeto Konstantin Gusev.

Ĉi-sube ni donas fragmentojn el la intervjuo de s-ano D. Blanke. La raportaĵon pri la vizito de K. Gusev vi povos legi en la sekva n-ro de „BE“.

EL LA INTERVJUO DE DETLEV BLANKE ANTAŬ „FREIE WELT“

Freie Welt.... Sed ni komencu de la komenco! Esperanto estas artefarita vorto, kiu devenas el la romana lingvo.

Detlev Blanke. Artefarita vorto supozigas artefaritan lingvon. Jam jardekojn oni uzas tiun ĉi argumenton kontraŭ Esperanto — ke ĝi estas morta lingvo, ne vivokapabla.

Fr. W. Tamen ĝi ja ne estas historie estiĝinta, sed „farita“ lingvo. Verŝajne, artisme farita, ĉu ne?

D. B. Pri tio ne dubas la amikoj de Esperanto.

Fr. W. Do, artisme farita „morta“ lingvo?

D. B. La kvalitoj „morta“ kaj „viva“ apartenas al la biologio kaj karakterizas la staton de iu organismo. Tamen la lingvo ne apartenas al la fenomenoj de la natursciencoj, sed al la sfero de la sociaj sciencoj. La lingvo, kiel la marksismo instruas, estas produkto de la socio, lerteco de la rezonkapabla homo — kaj ne evoluiganta organismo... Esperanto laŭ sia deveno estas planita lingvo...

La sola planlingvo, kiu posedas ampleksan tradukitan kaj originalan literaturon, kies parolantoj estas organizitaj en multaj internaciaj asocioj kaj okazigas mondkongresojn kaj multajn internaciajn aranĝojn, estas Esperanto. Tiu ĉi lingvo montriĝis tute taŭga en la ĉiutaga vivo, samkiel en la sferoj de scienco, tekniko, arto. Nun aperas 120 Esperanto-periodaĵoj, multnombraj beletraj verkoj („Hamleto“ de Ŝekspiro, „Faŭsto“ de Goethe), poemoj de Heine (Hajne), „Sorto de homo“ de (Solohov) kaj sciencaj (pri kemio, matematiko, medicino, verkoj de Marks, Engels, Lenin) estas tradukitaj en Esperanton; 72 eldonejoj periode eldonas Esperanto-literaturon. (La Esperanto-Muzeo en Vieno posedas pli ol 16000 titolojn). En 1969 j. okazis 3133 disaŭdigoj kun 1089 horoj el 16 radiostacioj en 14 landoj. Radio Varsovio ekzemple ĉiutage dufoje disaŭdigas programojn en la Internacia Lingvo...

Fr. W. La internacia kunlaborado ampleksas ĉiam pli kaj pli da faksferojn kaj popolojn. La aplikado de unueca internacia komprenilo ŝajnas logika paŝo. La latino apenaŭ estas taŭga. Ellerni ĝin postulas multe da energio kaj tempo, krome en sia nuna stato ĝi estus por niaj bezonoj ne plu sufiĉa. Kio estis la latino en la mezepoko, povus esti Esperanto en nia jarcento.

D. B. Mi opinias, ke la raciigo de la internacia lingva komunikado estas nepre necesa. Laŭ sciigoj de UNESKO nuntempe la duono de ĝia scienca literaturo estas skribita en lingvoj, kiujn pli ol la duono de ĉiuj sciencistoj el la mondo ne povas legi. El sovetaĵ publikajoj

(E. Swadost, 1968) estas videble, ke preskaŭ 70 procentoj de ĉiuj labor-akiritaj koneĵoj en la tuta mondo perdiĝas, ĉar tiuj, kiuj ilin bezonas, ne ekscias pri ili. Dufojaj kaj multfojaj inventoj de jam inventitaj aĵoj okazas pli kaj pli ofte.

Fr. W. Sed ja estas eble elekti iun nacian lingvon kiel tutmondan lingvon por interkompreniĝo.

D. B. Estas eble, sed kiun? Tiurilate ekzistas komplikaj politikaj problemoj, kiuj, laŭ mia opinio, neniigas la eblecon pri unu nacia lingvo kiel internacia. Krome, ĉiam pli kaj pli da lingvoj akiras signifon en la internacia komunikado kaj volas esti rigardataj kiel egalrajtaj. Multaj ŝtatoj klopodas nuntempe pri evoluo de propra ŝtatlingvo. En Ŝri Lanka ekzemple la angla lingvo ne plu estas ŝtatlingvo, sed singalezi; en Togo oni strebas al evoluigo de la indiĝena lingvo eĉ kaj en Etiopio — pri la amara lingvo. Aŭ ni rigardu la situacion en la internaciaj organizaĵoj. La Ligo de la Popoloj havis du laborlingvojn: francan kaj anglan. UNO (la Organizaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj) havas kvin oficialajn lingvojn kaj la Ĝenerala Konferenco de UNESCO eĉ ok.

Fr. W. Esperanto dum sia okdekjara ekzisto travivis periodojn de progreso kaj malpermesoj...

D. B. Progreson Esperanto havis en la dudekaj jaroj. Nur malmultaj laboristoj disponis pli altan klercon kaj fremdlingvajn konojn. La facile lernebla Esperanto estis por ili rimedo senpere kontakti kun la internacia proletaro.

Fr. W. Aparte intimajn kontaktojn havis la germanaj laboristoj kun la laboristoj el la soveta ŝtato.

D. B. Pri la kontaktoj inter la germanaj kaj sovetaĵ esperantistoj antaŭ 1933 oni povus skribi dikan libron. Tie ĉi ni atendas la helpon de la historiistoj! Unuafoje en sia historio Esperanto estiĝis ilo de la malsataj por klerco laboristaj amasoj. Lunaĉarski, popolkleriga komisaro kaj kunlaboranto de Lenin, en 1926 antaŭ la internacia proleta Esperanto-kongreso en Leningrado deklaris: „La faktoj estas obstinaj kaj la faktoj parolas por Esperanto“.

Fr. W. La germanaj kaj la sovetaĵ laboristaj Esperanto-asocioj apartenis al la plej fortaj en la mondo, ĉu ne?

D. B. Jes, tio estas ĝusta. Ĉar fine de la dudekaj jaroj la imperiismaj fortoj en Germanio estiĝis pli kaj pli agresivaj kaj samtempe alpaŝis pli kaj pli malkaŝe al forigo de la lastaj restaĵoj de malforta demokratio, por multaj

laboristoj-esperantistoj tio signifis decidi sin. Jam en tiu tempo la amikeco kun Sovetunio estiĝis provŝtono por la vera klaskonscio. Tiam ekzistis multaj intimaj amikecaj ligoj inter germanaj kaj sovetaj laboristoj-esperantistoj kaj konkurado inter germanaj kaj sovetaj uzinoj. Tiuj ĉi revoluciaj tradicioj kaj ilia krea utiligo por la nuntempa kaj estonta laboro estas bazo por agado de la Centra Laberrondo.

Fr. W. Kiel aspektis tia konkur-programo?

D. B. Ekzemple inter Chemnitz (Kemnic) kaj Ŝepetovka ĝi aspektis tiel: la du laboristaj Esperanto-grupoj interkonsentis starigi kontaktojn inter dek fabrikoj el ambaŭ flankoj, kontraŭstari al mensogoj kaj demagogiaj trompaj sciigoj kontraŭ Sovetunio pere de publikigo de faktoj, inviti al Ŝepetovka okaze de la 1-a de majo 1933 grupon de laboristoj el Kemnic, preni patronecon super laborista familio el Kemnic, kies prizorganto estas arestita ĉe la reakcio.

Fr. W. En 1933 ĉio estis neniigita, ĉu ne?

D. B. Jes, la ŝovinista politiko de la faŝistoj kaŭzis la malpermeson de la Esperanto-movado en Germanio. En 1933 estis malpermesita la Laborista Esperanto-Asocio kaj tri jarojn poste — ankaŭ la burĝa asocio.

Fr. W. En 1965 sekvis denove organizado en la kadro de la Kulturligo, ĉu?

D. B. Ekde sep jaroj la E-amikoj en la Kulturligo havas sian oficialan hejmon. En 1965 estas fondita la Centra Laborrondo Esperanto de GDR en Kulturligo, kies membroj plejparte antaŭ 1933 apartenis al la revolucia Germana Laborista Esperanto-Asocio. Sur la bazo de distriktoj kaj subdistriktoj nun en GDR funkcias 13 distriktaj laborrondoj Esperanto kaj 60 subdistriktaj laborgrupoj. Por ni en GDR Esperanto estas rimedo de la klasbatalo. La esperantistoj el GDR uzas tiun ĉi internacian lingvon por altigi la prestiĝon de sia respubliko en eksterlando.

El la Esperantaj leteroj

Kretinga, la 22-an de oktobro 1972

Kara s-ano Minko,

... La septembro de tiu ĉi jaro¹ por mi estis unu el la plej feliĉaj tempoperiodoj de mia vivo. Mi sukcesis konatiĝi kun belega lando, traveturis milojn da kilometroj, vidis ĉirkaŭ 30 urbojn kaj urbetojn, ĉiujn viajn montarojn, multajn monaĥejojn, antaŭ ĉio la Rila-n, naturajn miraklojn kiel la groto Lednika, riĉajn muzeojn, galeriojn, antikvajn konstruaĵojn aŭ ruinaĵojn (Veliko Târnovo), ĉarme-gajn neforgeseblajn palacojn, parkojn (Balĉik), ĝenerale tiajn lokojn, kiuj povas mirigi ĉiun homon: Kaliakra, Nesebâr, Plovdiv ... Mi vizitis kelkajn „pazarojn“², vidis kaj gustumis multajn fruktojn kaj legomojn de Bulgario. Ĥin mi ofte vidis unuan fojon, tial ĉio por mi estis interesa (juglandarbo, persikarbo, „djulja“,

„smokinja“³ ktp.)

Apartan agrablecon al mi donis la bulgaraj pejzaĝoj. Mi vekigadis frue kaj ĝis vespera mallumo penis eĉ por unu momento ne fermi okulojn por rigardi kaj per ĉiam konservi tiujn neripeteblajn belaĵojn.

Kaj kion diri pli la plej grava trezoro de via lando — la homoj? Mi estis kortuŝita pro ilia amikeco, gastamo, bonkoreco, patriotismo, bonegaj konoj pri sia lando, laboremo, pureco, „oraj manoj“ de ŝpinistinoj, teksistinoj, trikistinoj, ankaŭ de konstruistoj kaj ŝoforoj (ili en siaj manoj dum multaj tagoj tenis mian vivon!).

Persone pri vi. La renkontiĝo kaj konatiĝo kun vi estis kvazaŭ preludo al mia restado en Bulgario. La unuaj impresoj estas ĉiam pli profundaj, tial malgraŭ ke mi
(*Sekvas sur p. 15*)

ESPERANTO-EKSPOZICIO EN BUDAPEŬTO

Por konigi la celojn kaj la utilecon de Esperanto oni aranĝis en Budapeŝto, en la Kulturdomo „Csili“, grandan E-ekspozicion, kiu daŭris de la 4-a ĝis la 11-a de februaro. Ĝin malfermis k-do Bela Berceli — ĉefsekretario de HEA.

Dum la tagoj de la ekspozicio okazis komuna ludo „Duoblo aŭ nulo“ kun valoraj premioj, filmprezentado, lotumado k. a. La ekspozicion vizitis entute 400 personoj.

Laŭ Erika Bardocz

(El „Budapeŝta Informilo“, n-ro 3/1973)



ANTAŬ LA TOMBO DE HO CHI MINH

Teksto: Marin Bâcev

Muziko: Elena Karastojanova

Tempo de marŝo

Ni sta-ras an-taŭ vi-a tom-bo en ĉi so-

le-na fes-ta hor'! Ju-bi-las ho-moj en la

mon-do, ĉar es-tas la mi-li-to for! Ju-bi-las

2. Eefreno

for! Po-pol' de l' Su-do kaj de l' Nor-do, fe-

li-ĉe vi-vu vi sen lim'! Vi pa-con gar-du

per kon-kor-do kaj re-me-mo-ru

kaj re-me-mo-ru kaj re-me-mo-ru

1.2. Ho-Chi Minh! Ĉu aŭ-das Minh!

3.

ANTAŬ LA TOMBO DE HO CHI MINH*

Ni staras antaŭ via tombo
en ĉi-solena festa hor'! . . .
Jubilas homoj en la mondo,
ĉar estas la milito for!

Refreno:

Popol' de l'Sudo kaj de l'Nordo,
feliĉe vivu vi sen lim'!
Vi pacon gardu per konkordo
kaj rememoru Ho Chi Minh!

Triumfas jam tra via tero
la paco en serena lum',
kaj bluas flagoj kun fiero
kaj gaje brilas eĉ la sun'! . . .

Ĉu aŭdas vi la kanton festan
de via vigla junular'?
Ĉu vidas vi, post temp' tempesta,
la ĝojon de la nova jar'?

* Legu: Ho Ŝi Min

(El paĝo 13)

renkontiĝis kun multaj homoj, kun multaj
esperantistaj familioj, „nia tago“, nia veturo
al „Bojanska Ĉerkva“⁴, la renkontiĝo en la
Sofia Universitato, la promeno tra la Parko
de Libereco, la majesteco de la katedralo

„Aleksandro Nevski“, la unika kaj por mi
nova vegetara restoracio, la unuafoje viditaj
„boza“⁵ kaj „kozunak“⁶ — ĉio estas ligita
kun via ĉeesto kaj neniam, neniam forgesbla.

Dankega al vi Sofia R.

¹ T. e. 1972 j.

² „Pazaro“ — bazarplaco, bazar.

³ „Djulja“ — cidonio; „smokinja“ — figo.

⁴ „Bojanska Ĉerkva“, t. e. Bojana-preĝejo;
ĝi troviĝas en kvartalo Bojana, je 8 km
for de la centro de Sofio, konstruita en
XI-XII j. c., fama ankaŭ eksterlande pro siaj

pentraĵoj, faritaj en 1259 j. Tiuj pentraĵoj
okupas unu el la unuaj lokoj en la mezepoka
pentroarto de Eŭropo en XIII j. c.

⁵ „Boza“ — refreŝiga miliotrinkaĵo.

⁶ „Kozunak“ — pastaĵo kun graso, sukero,
ovo kaj lakto.

FORPISIS ATANAS LAKOV

Je la 22 de februaro forpasis nia fervora sa-
mideano kaj altkonscia civitano Atanas Lakov
Petkov.



Li estis naskita en v. Sadovec, Pleven-di-
strikto, en 1903. Tre frue, jam en 1921 j., la
junulo kun vigla socia sento fariĝis membro
de Bulgara Komunista Junulara Unuiĝo. Kiel
studento li estis unu el la fondintoj de la
glora revolucia Bulgara Ĝenerala Popola Stu-
dentunuiĝo (BONSS). Dum tiuj jaroj li ellernis
ankaŭ Esperanton. En 1929 j. Lakov estis
kunfondinto de la Laborista E-Asocio en nia

lando kaj membro de l'Redakta Komitato de
la E-periodaĵo „Balkana Laboristo“. Ĝis la tago
de la liberiĝo el la faŝismo (9.9.1944) li
laboris kiel agronomo kaj aktive partoprenis
la kontraŭfaŝistan batalon.

Post la 9.9.1944 Lakov eklaboris en la
Ministerio de l'Agrikulturo kaj poste, ĝis sia
emeritiĝo, kiel ĉefredaktoro de la eldonejo por
vilaĝmastruma literaturo „Zemizdat“.

Atanas Lakov multjare estis membro de CK
de BEA kaj de la redakta komitato de „Bul-
gara Esperantisto“. Li partoprenis multajn
universalajn kongresojn de Esperanto.

Samtempe Lakov estis talenta tradukanto de
poezio en Esperanto. Al lia plumo apartenas
multaj tradukoj el Smirnenski, Vapcarov kaj
diversaj nuntempaj poetoj. Kun granda zorgo
li flegis la junajn talentojn de nia Movado,
speciale la poetojn.

En la personeco de Atanas Lakov la bul-
gara E-movado perdis sindonan kaj talentan
batalanton. Sed antaŭ lia tombo la multnom-
braj partoprenantoj de la enteriga ceremonio —
esperantistoj kaj neesperantistoj — ĵuris daŭ-
rigi lian aferon — la konstruadon de la plej
justa homa socio, la socialismo-komunismo,
kaj la batalon por triumfo de la nobla Espe-
ranto-afero.

Ĉe la enteriga ceremonio pri la vivovojo
kaj agado de Atanas Lakov parolis K. Vă-
lev — en la nomo de CK de BEA, reprezen-
tintoj de multaj organizaĵoj kaj institucioj, de
liaj malnovaj kamaradoj kaj kunbatalantoj ktp.

POR LA MALGRANDAJ ESPERANTISTOJ

ĈIPO FANFARONULO

de Zenta Ergle

— Unu, du, unu, du, la flugiletojn malfermu pli larĝe, kapetojn levu supren! — la paruo Zinĉjo instruis al siaj infanoj la unuajn flugospertojn.

Kvin, la pli aĝaj infanoj, diligente ekzercis sin, starante sur la nestorando, sed la plej juna infano, Ĉipo, faris nenion. Ankoraŭ pli malbone — li eĉ senhonte primokis siajn gefratojn.

— Mi jam delonge scipovis flugi, — li fanfaronis. — Foje, kiam vi dormis, mi preskaŭ flugatingis la sunon, jes.

— Pli multe da nutraĵo oni povas trovi en la ĝardeno, — klarigis la paruo-paĉjo. — Tie vivas diversaj bongustaj skarabetoj kaj molaj vermoj.

— Kial mi devas klopodi por serĉi nutraĵon, se miaj gepatroj alportas kaj eĉ metas ĝin en mian buŝon? — En la kapo de Ĉipo nestis propra opinio.

— Ni, malgrandaj birdetoj, havas multajn malamikojn, — instruis Zinĉjo, — dupiedajn, kvarpiedajn, eĉ flugilhavajn.

— Ili nur provu veni, — fiere respondis Ĉipo, — mi mortbekos ilin. . .

— Mirinde, kie mi trovis tian infanon, — plendis la patrino. — Li nur scipovas dormeti la tutan tagon kaj primokas la aliajn. Sed por tagmanĝi venas la unua.

Post la lernado sekvis la ekzamena tago. Ni ĉiuj venis por rigardi la unuan flugadon de la junaj paruoj. La flugvojo estis elektita inter la avelararbejo kaj la rozarbusto.

La plej aĝaj infanoj de la paruo unu post la alia ekflugis aeren de sur la nestorando. Baldaŭ ili, kvinope, sidiĝis sur la rozarbuston. Ili aspektis belege en siaj verdaj jaketoj kaj flavaj plumpantalonoj.

— Mi flugos alidirekten, — ekkriis Ĉipo, svingis siajn flugiletojn kaj supreniĝis aeren. Sed tuj poste, simila al

ŝtono, li falis teren.

Ni ne vidis, ke el la arbusto aperis la najbara virkato Satano.

— Iru for vi, nigra fantomo! — laŭte ekkriis Ĉipo.

Sed la virkato per kelkaj saltoj troviĝis jam apud la parueto kaj piedpremis ĝin al la tero.

— Panjo! — dolore ekpepis Ĉipo.

Ni kuris por savi, kio estis ankoraŭ savebla.

— Mi ne redonos la birdon, — grumblis Satano.

Ĝiaj okuloj brilis simile al du reflektoroj. Mi devis kapti la katon ĉe la kapo kaj perforte forpreni la birdeton.

— Ĉu vi ne hontas? — Artis instruis Satanon. — Ĉu vi ne konas la ordon-leĝojn de nia ĝardeno?

— Mia kapo estas maljuna, — responde grumblis la virkato.

— Tiam aŭskultu kaj atentu, kiel sonas la dua paragrafo: „Ĉe ni estas malpermesite ataki kiun ajn vivan estaĵon. La puno antaŭvidas forpelon el la ĝardeno.“

— Mi neniam plu faros malbonon, — Satano flateme sin frotis ĉe miaj piedoj. — Pardonu min ĉi-foje!

Liaj okuloj estis ruze duonfermitaj, similante du mallarĝajn striojn.

— Iru tamen for vi, maljuna fripono! — diris Ĉiko kaj Riko, forigante la katon tra la ĝardena pordeto.

La malbona kato estis vundinta per siaj akraj ungoj la flugilon de Ĉipo. Ni bandaĝis ĝin.

— Jen kio okazas al fanfaronuloj! — diris la paruo Zinĉjo.

— Mi estonte pliboniĝos, kredu min! — Ĉipo diris promese. Kaj li ne forgesis sian promeson.

El la latva: S. Neilande

INTERNACIAJ KURSOJ KAJ SEMINARIO DE ESPERANTO POR INSTRUISTOJ APUD NIGRA MARO

Sub la aŭspicio de Internacia Ligo de Esperantistoj-Instruistoj (ILEJ)

I. INTERNACIAJ ESPERANTO-KURSOJ POR INSTRUISTOJ:

6—25 de aŭgusto 1973

- I grado — komencantoj
- II grado — progresintoj
- III grado — por instrurajto

II. INTERNACIA PEDAGOGIA ESPERANTO-SEMINARIO:

12—25 de aŭgusto 1973

En la Seminario povas partopreni instruistoj kaj kursgvidantoj de Esperanto por plua perfektigo kaj diplomigo.

La Kursoj kaj la Seminario havos siajn lecionojn en la Teknikumo en kvartalo „Meden Rudnik“, Burgas.

Tiuj, kiuj sukcese faros la respektivajn ekzamenojn por la I kaj la II gradoj, ricevos atestojn, kaj por la III grado kaj la Seminario — oficialan diplomon por instrurajto de Esperanto.

Kotizoj por la Kursoj: por bulgaroj — 65 levoj, por alilandancj — 100 levoj

Kotizoj por la Seminario: por bulgaroj — 42 levoj, por alilandanoj — 70 levoj.

Antaŭpago — almenaŭ la duonon de la kotizo ĝis la 1 de julio; la dua duono — ĉe la alveno en Burgas. Ĉar la nombro de la partoprenontoj estas limigita, validos ĉiam la pli frua aliĝo.

La bulgaroj devas antaŭpagi al adreso: София, ДСК Благоевски район, с/ка 185/2553, на Софийския окръжен есперантски комитет.

La alilandanoj devas antaŭpagi al adreso: Bulgario, Sofio, ĉrez Bălgarska Vânătârgovska Banka — do D. S. Kasa, Blagoevski Rajon, сметка 185/2553 на Софийски Окръжен Есперантски Комитет.

Farinte antaŭpagon, per letero informu la estraron de la Kursoj al adreso: Sofio, bul. Ĥr. Botev 97, Distrikta Esperanto-Komitato (tel. 83-26-82), indikante ankaŭ la gradon, en kiu Vi studos.

La tempo de la kursodaŭro estas konsiderata kiel ofica.

KARAJ GEINSTRUISTOJ EL ĈIUJ LANDOJ,

Venu studi! Venu perfektigi! Venu ĝui la sinceran Esperantc-amikecon kaj la ĉarman Nigran Maron!

ВАЖНО!

Набавете си от книжарниците на Българската есперантска кооперация в София:

Учебник по есперанто от <i>Ив. Сарафов</i> и <i>Сим. Хесанчиев</i>	0,85 лв.
Есперанто-български речник от <i>Асен Григоров</i>	0,50 лв.
Българо-есперантски речник от <i>Асен Григоров</i>	0,56 лв.
Есперанто-български разговорник	0,80 лв.
Грамофонни плочи с есперантски естрадни песни от <i>Мишо Здравев</i>	1.— лв.
La Tuta Esperanto de <i>Henrik Seppik</i> . Kurso por progresintoj	1,35 lv.
Elektita verkaro de <i>Hristo Botev</i>	1,58 lv.
Bulgara Prozo (Antologio)	0,65 lv.
La alia Ameriko de <i>Svetoslav Minkov</i>	0,24 lv.
Sub la Jugo de <i>Ivan Vazov</i>	1,04 lv.
Flugas kanto tra la mondo. Kantaro kun muziknotoj . . .	1,41 lv.

Поръчки по пощата правете само чрез пощенски запис. В записа отбелязвайте сметка 130/086 БНБ 4 — София. На дружества и комитети се прави 5% отстъпка при поръчки над 5 лв.

ЛЕТНИ КУРСОВЕ ПО ЕСПЕРАНТО

Всеки може да изучи есперанто в курсовете на кооперацията, организирани в с. Дружево, Софийско (в Стара планина).

I смяна за начинаещи — 15 — 29. VI. 1973 г.

II смяна за начинаещи — 5 — 19. VII. 1973 г.

III смяна за напреднали — 10 — 24. VIII. 1973 г.

Таксата за всеки курс е 35 лева и включва храна, спане и лекторско възнаграждение.

Сумите изпращайте до кооперацията, като в пощенския запис отбелязвате в кой курс желаете да участвувате.

СТАНЕТЕ ЧЛЕН НА БЪЛГАРСКАТА КООПЕРАЦИЯ!

БЕК набира своите членове между българските есперантисти и приятели на есперанто. Встъпителната вноска е 2 лв. плюс делова вноска от минимум 1 лв.

Станете член на БЕК и ежегодно увеличавайте деловите си вноски. Те са сигурни спестявания, подпомагат развитието на есперантското движение и носят годишно 6% дивидент.

Поръчки за книги, такси за курсове и членски вноски пращайте на адрес: *Българска есперантска кооперация, ул. Неофит Рилски 18, София (тел. 51-28-75).*